

# EKO 2025

## Bleko kun eĥo

EKO 2025-08. Feb 18. Pezo: 300 KB, Alkroĉaĵo: SEMAS. UN 74.

## Inda UK en Brno atendata

Je la 15-a de februaro 2025 aliĝis jam 754 personoj el 57 landoj al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-somere en Brno. La plej multaj aliĝintoj estas el la kongreslando Ĉeĥio kaj Germanio. po 86 personoj. Sekvas Pollando kun 72 aliĝoj, Francio 63, Koreio 31, Ĉinio 30, Hungario 27, Italio 23, Hispanio 22, Slovakio kaj Brazilo po 19, Japanio 18, Usono 17 kaj Britio 16.



## AMO-seminario en Kroatio omaĝas al Renato

AMO 112 okazos en la 22-a de februaro. Temo: 'Renato: ĉies amiko'. Brila elekto. De jaroj la AMO-seminarioj rilatis al amikeco, laŭ la formulo de la sveda estrarano de UEA, Eric Carlén. Jen la konkretigo de tio, laŭ la aktiveco de Renato. La EKO-komuniko aplaudas.

Feb 22, 2025 13:00 - 17:00 UTC

<https://us02web.zoom.us/j/81109583630?pwd=6EWZ8db01rcXaisSWa12VlnRo7GOCK.1>

Kunven ID: 811 0958 3630; Pasvorto: SIA2025

## Aminda elsendo 148 el Malagasio

Ni alportas al vi novaĵojn el la kuranta monato kaj la unuan parton de la artikolo pri komerco en la 19-a jarcento en Malagasio. Ĉu sklava komerco dominis tiutempe? Malkovru la surprizajn faktojn pri aliaj gravaj komercaj aspektoj. Por subteni la Radion Esperanto lasu reagon en la komentoj. Diskonigu ĉi tiun podkaston al viaj geamikoj kaj samklubanoj. Subtenu nin finance per PayPal: [henrieldredtv@gmail.com](mailto:henrieldredtv@gmail.com) aŭ UEA-konto: **fidi-d**. Aliĝu al nia komunumo!

Henriël FIDILALAO, Madagaskaro

## IEJ ĝoje invitas vin al la 48-a Internacia Junulara Festivalo!

Venu esperantumi kun ni dum la paska semajno de la 17-a ĝis la 22-a de aprilo en Torricella di Magione (PG), ĉe Lago Trasimeno, en la pitoreska regiono Umbrio, kun ĝiaj belaj pejzaĝoj kaj unika kulturo. Riĉa programo atendas vin, kun atelieroj, prelegoj, multaj aktivaĵoj; koncertoj por ĝui muzikon kaj festi kune, ekskursoj al Lago Trasimeno kaj la urbo *Perugia*, kun vizito al la fama fabriko de la *Baci Perugina* (Peruĝaj kisoj), por malkovri la sekretojn de la ikonaj ĉokoladaj dolĉaĵoj. Ne forgesu pri postkongresa ekskurso al Florenco! La fokuso estos pri artefarita inteligento. Ĉu vi pretas por semajno

plena je Esperanto, kulturo kaj amikeco? Por pliaj informoj kaj aliĝo, sekvu niajn kanalojn aŭ skribu al nia retadreso ([iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it))

**SMG:** Mi memoras partopreni la unuajn IJF-ojn. La unuan en Trento (senfina pluvo), la duan en Jezolo, la trian en Massa, kaj la kvinan en la montaroj ĉe Poretta Terme.

## Pli da kondolencoj por Renato

Nome de la ELI-Estraro kaj de la Israelaj esperantistoj akceptu elkorajn kondolencojn pro la forpaso de nia kara amiko Renato -- granda perdo por la familio kaj Esperantujo.

Jehoŝua Tilleman kaj Amri Wabdel

Mirega homo, nesuperebla en sia konstanta, fruktodona laborado por Esperantio. Nia verda komunumo perdis realan estron, kiu perfekte modelis nian ideon pri Majstreco. Li bedaŭre ne plu estos fizike kun ni, sed neniam niaj koroj forgesos lin.

Hugo Mora. Kostariko

Senvorte la plago ŝtelis homon veran! Kondolencon al la familio kaj ĉiuj ni. Memoron indan ni flegu per kompilo por la libro pri kara nia Renato. Ni kolektu la memor-historietojn kaj fotoĵojn de li kaj lia tre fidela rilato al Esperanto.

Eŭheno Kovtonjuk, Ukrainio

Multaj japanaj esperantistoj esprimas kondolencojn al Anna kaj familianoj. Lia kontribuo al Esperantujo estis grandega, speciale por azianoj lia sindonema klopodo por altigi lingvan kapablon de aziaj komencantoj estas neforgesebla. Li regule organizis senpagajn kursojn por aziaj komencantoj aŭ meznivelaj. Pri Eo-informado, li ĉiam kontaktis la Informadan Komisionon de JEI por disvastigi afiŝojn en la nacia lingvo. Ni ne forgesos tiun grandan animon kaj favorkoran karakteron. Li eterne kuraĝigu nin.

Ikuko KITAGAWA, (prezidanto de Japana Esperanto-Instituto)

Mi rapide informis la ĉinajn esperantistojn pri lia forpaso per diversaj Esperanto-grupoj ĉe Vi-Ĉato (*We-Chat*). Ili aktive reagis kaj esprimis grandan amon kaj admiron al li per funebraj vortoj, rakontoj, filmetoj, poemoj kaj kaligrafio. Mi daŭrigos mian kolekton pri la reagoj. Memore al Renato, nia klubano, mi verkos por li artikolon, kaj proponos, ke nia klubo okazigu por li memoran kunsidon.

Pere de A. Madella



Perdo granda. Mi deziras fortojn al Anna kaj familianoj. Li vaste instigadis, inspiris, kunlaboris, helpis. Kontakto nur kun unu persono, nia kontakto, kaj konkreta kunlaboro pri diversaj aferoj, estis intensaj. Ni multipliku tion per centoj, eble per milo(j). Esperantistoj memoras, ke li volis, ke Esperanto disvastiĝu al novaj terenoj de la mondo. Rememoreto: ni kune subtenis la esperantistecon de jemena junulo, kiun allogis al Esperanto mia eks-studentino, kiu estis lia instruistino en la jemena ĉefurbo. Interalie, ni instruis lin. Laŭ Renato, la junulo estis la sola esperantisto en Jemeno, pri kiu ni sciis.

Maria Majerczak

Je la nomo de la Komora Esperanto-Asocio kaj je mia propra nomo, ni esprimas niajn profundajn kondolencojn por la forpaso de nia granda amiko Renato C.

ALI Mze el Komoroj

Jen la registraĵo de la kunveno omaĝe al kara Renato: <https://youtu.be/xhXVgeafvls>

Sendis: Ahmad Mamduhi, ILEI

## Kostariko krias artisme

Pasintsemajne mi estis intervjuita de la Mezamerika Konservejo de Kultura Propraĵo\*, kiu estas iniciato de la Instituto pri Artaj Esploroj (IIArte)\*\* de la Universitato de Kostariko. La intervjuo estis publikigita en Instagram. Temas pri unu el tri aŭ kvar videaĵoj, kiuj estos publikigitaj en kiuj mi parolas pri arto.

Parto 1 <https://www.instagram.com/reel/DFogjniuCDh/?igsh=MWJrbnowdzQzZGZzcw==>.

Parto 2: <https://www.instagram.com/reel/DFq3ohgORYe/?igsh=dGpuYzRkYTJ3M3Ey>

Antonio León, Kostariko

Elektronikaj adresoj kaj de la Konservejo kaj de IIArte:

\* <https://repositorio.iiarte.ucr.ac.cr>; \*\* <https://iiarte.ucr.ac.cr>

## Turgenev tradukita

Traduko de la dua parto de *Versaĵoj en prozo* de Ivan Turgenev ĵus aperis kiel senpaga literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*. Ĝin tradukis tripersona teamo: Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov kaj Ludmila Novikova. Ĝi aperis kiel bitlibro laŭ la normoj *pdf* kaj *epub*. La abonantoj bonvolu elŝuti ĝin en nia elŝutejo.

Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/02/turgenev-3/>

## Afrikanoj semas kaj semas konstante

La membroj de la Afrika Komisiono de UEA kunvenis por elekti la plej bonajn projektojn kadre de NI SEMAS. Kandidatiĝis 6 landoj: Burundo, Gambio, Kongo DR, Madagaskaro kaj Kenjo. La Afrika Komisiono ricevis 11 projektojn el kiuj ok estis elektitaj.

- Po 2 projektoj el Burundo kaj Madagaskaro.
- Po 1 projekto el Tanzanio. Kenjo, Gambio, Kongo DR.

Alkroĉite la dokumento kiu montras la projektojn.

Aime Patrick Manirakiza, Kunordiganto de la Afrika Komisiono

## Eŭroponivele en Graz

S-no Luigi Fraccaroli, la sekretario de Eŭropa Eo-Unio instigas ĉiun partopreni la kongreson en Graz (majo 9-11). Tio estos kvazaŭ kiel Eŭropa Konferenco espereble laŭ la grandeco kaj graveco. Ni havos la ŝancon kune festi la Tagon de Eŭropo.

Espereble ankaŭ la Eŭropaj EDE-anoj (Eŭropo Demokratio Esperanto) havos tie grandan renkontiĝon. Kiel S-ro Didier Janot skribas: "En Graz troviĝas la Eŭropa Centro por Modernaj Lingvoj (ECML) de la Konsilio de Eŭropo <https://www.ecml.at>

Ĉu estos programero en rilato kun ĝi? Mi certas, ke se ne iu alia, la urbestriko de Graz povas helpi organizi tian programeron. Tiu povos esti je strategia graveco por la Eŭropa movado. La urbo kaj la organizantoj esperas je amasa partopreno de esperantistoj.

## Facile flugu

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/mortis-hungara-verkisto-istv%C3%A1n-nemere-r459/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/esperanto-kaj-la-movado-de-nova-kulturo-en-%C4%89inio-r460/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/referendumo-%C4%89u-demokratia-ilo-r464/>

## UN-Bulteno refoje

**Numero 74 – jan – feb 2025:** Tago de Homaj Rajtoj 2024: Kurfesti kaj kunprotesti.

□ Konferenco en Montevideo markis 70 jarojn da kunlaboro inter Unesko kaj Esperanto por lingvaj homaj rajtoj. <https://youtu.be/jkDPG5pPgOk>

## Esperantologia Konferenco en la UK

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la **47-a Esperantologia Konferenco (EK) de CED**, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo okazos kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno. La programo enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina rondotablo pri la nunaj esploraj defioj de esperantologio rilate al la traktitaj temoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj esplor-objektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj, kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko rilate al la kongresa temo: Esperanto kaj teĥnologioj. Surbaze de la prezentoj, kelkaj elektitaj tekstoj, redaktitaj de la aŭtoroj por publikigo, aperos en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*.

**Ni invitas ĉiujn fakulojn – precipe junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn – sendi proponojn** pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti sendataj al la retadreso [ek47@interlingvistiko.net](mailto:ek47@interlingvistiko.net).

La limdato por proponoj estas la **30-a de aprilo 2025**. Por kompari la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu [la retejon de CED: https://interlingvistiko.net/](https://interlingvistiko.net/).

Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, Organizantoj de EK 2025  
Michele Gazzola, Ulster University, [www.michelegazzola.com](http://www.michelegazzola.com)

## Unesko kurieras pri sklaveco

‘La profunda heredaĵo de sklaveco’ estas la ĉefa temo de la tria pasintjara numero de *Unesko-Kuriero* (julio-aŭgusto 2024), kun tradicia malfruo aperinta en la elŝutejo de Unesko. Ĝia Esperanta eldono estas senpage elŝutebla. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/01/unesko-40/>.

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaja Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj.